


# ESPERANTA FINNLANDO

1969 numero 5


A

Junio



**Bonvenon  
al**





*Suomi! Vi estis al mia animo ĉiam la lando de l' revoj, la lando de l' pratempaj fabloj heroaj. Ĉi tie vivis la gloraj fratoj: Väinämöinen la eterna kantisto, kies instrumento la dolĉsonora kantelo rulis el ĉiuj okuloj la larmojn de l' ravo kaj kortuŝo, kaj Ilmarinen la lerta kaj genia forĝisto, la forĝinto de l' ĉielarkaso. Ĉi tie estis farita per lertaj manoj kaj akirita per fortaj brakoj la mirakla muelilo Sampo, kiu donas abundon kaj feliĉon malavare. Väinämöinen, Ilmarinen, gloraj idoj de prapatro Kaleva, mirinda, fabla, heroa epoko de Kalevala, ĉu vi perdiĝis droninte en la nebuloj de l' malproksimaj tempoj? Ho ne! Kantema, fablema popolo konservis vin ame fermite en sia koro, kie vi plu vivas vian vivon eternan. Kaj la runojn pri vi babilas la ondoj de mil brilantaj lagoj eĥas la muskaj montoj, murmuras la majestaj abiaroj. Aŭdu:*

### KONGRESA RUNO.

*Vokas voĉ' de Väinämöinen  
Vibras vok' en vaga vento  
Kaj ĝin muĝas malproksimaj  
Montoj, maroj murmurantaj.*

*La polenca praa patro  
De la kantoj karesantaj,  
La bravulo kun la brila  
Balaanta blanka barbo  
Kaj ĉe l' koro kun kantelo  
Kies kordoj sorĉe sonas,  
Ravon semas en la sinoj:  
Väinämöinen vekiginta  
Vigle, veke, varbe vokas,  
Logas li al land' de l' lagoj  
Kun la filoj festi frate.*

*Vibras voĉ' en vaga vento:  
»Songis mi en sankta sino  
De Suomi kaj ripozis  
En la revoj, rememoroj  
De la idoj inspiritaj.  
Sed min vekis vok' de l' tempo.  
Min el muska tero tiris  
Sorĉaj sonoj sonorantaj.*

*Miri venis mi miraklon:  
Patrolingvon de la Mondo:  
Lingvon, kiu liutsona,  
Lule ludas sur la lipoj,  
Flate, flustre, flirte, flugas.  
Dolĉon donas dorlotante,  
Muĝas, kiel mar' majesta,  
Kun tilana tono tondras:  
Ideala inda ilo,  
Instrumento konkuranta  
Kun la kordoj de kantelo.  
Fablan forton fepotencan,  
Kiu tegas tutan teron  
Kaj por arda amo armas.  
El la disaj, dividitaj  
Gentaj grupoj glore formas,  
Fandas fratan familion,  
Ravan rondon sub radioj  
De l' eterna esperstelo.  
Ege eĥu elementoj,  
Resonadu regionoj  
Vekan, varban, vokan voĉon  
De la nobla nova sento!*

*Helpi venis mi heroojn,  
Helpi homojn hederindajn  
En la brava batalado  
Por la bono, por la beno  
De la mondo baraktanta.  
Kantu, kordoj de kantelo  
Ilin inde invitante  
Al la kampoj kalevidaj.*

*Am-armeo! Amasiĝu!  
Armu vin per arda amo!  
Festu frate kun la filoj  
Kaj sen laco laboradu!  
Luktu firme, forte, fajre  
Kaj sufoke kaptu kole  
Tiun urson ulnongan,*

## Poemoj de Eino Leino

### Aleksis Kivi

#### LA KANTO DE MIA KORO

Morta valo, nokta valo!  
Al la sabla lulvualo  
mian infanon mi gvidos.

Tie estas ĉarme esti  
sur Mortulaj kampoj resti,  
Paŝti Mortejan brutaron.

Estas tie ĉarme resti,  
sin krepuske lulbalanci  
sine del Morta virgino.

Dorlotate ĉarmas esti,  
en lulilo ora tranci,  
aŭdi la noktan ŝpinbirdon.

Morta spaco, paca spaco,  
for malpaco, for minaco,  
for estas mondo perfida.

Sep fratoj 1947

#### *Monstron de la Mortolando:*

*La militon malicegan.  
Kreu kuna konstruado  
Novan, sanktan, savan Sampon  
Mir-miraklan muelilon  
Por mueli la malamon  
Mondon monstre mordadantan.  
Fine idoj inspiritaj,  
Kiel iam Ilmarinen,  
Forĝu firman firmamenton  
Kun ĉielaj ĉiuj ĉarmoj  
Dian pompan mondpalacon:  
Pian pacon paradizan  
Kun la dolĉaj didonacoj  
De la fabla feliĉego.»*

*Al la land de l' mil' da lagoj,  
Muskaj montoj murmurantaj  
Velflugante kun la vento  
Vokis voĉ' de Väinämöinen.*

*Kolomano de Kalocsay.*

#### Vin rigardis mi, fraŭlino —

Vin rigardis mi, fraŭlino  
kiel knabo novludilon,  
vin aŭskultis mi, fraŭlino  
kiel arbaro printempa  
kanton de ora kukolo.

Mian bruston vi florŝutis,  
mian ĝojon vi elkantis  
kaj printempsopiron vekis,  
melodion ĝian vokis  
por murmuri riverete,  
el kantelo\* resonadi  
subtenata de la ventoj,  
rejetata de la montoj.

Tia nun la ĝojo mia:  
kiel knabo sen ludilo,  
tia nun la vivo mia:  
la printempo sen kukolo,  
monto silentas, floro forestas,  
blua arbaro malgaja.

#### Kio pli bela

**Kio pli bela:**  
kredi, ke venkos baldaŭ libero,  
fidi triumfon de lumo kaj vero  
kaj lukti fidele por lumo?  
aŭ nur batali  
konvinkita: ne estos lumero,  
certa pri falo de la libero,  
kaj tamen batali?

**Kio pli bela:**  
pensi: se venkos neniam libero,  
mediti: se estingiĝos lumero,  
kial mi tiam batalus?  
aŭ ĉu pensadi:  
naskiĝis mi antaŭ la sunsubiro,  
heroo de lumo, ne del akiro:  
falo al mi estas vivo.

Trad. Vilho Setälä





### Legendo

Rakonto diras, ke Savanto foje  
kun Petro estis tra la mond survoje  
kaj, trans larĝa spac de akvo, tero  
atingis Suomi en somervespero.

Eksidis ili kune sub betulo  
sur klina bordo de duoninsulo,  
interparolis multe kiel ĉiam,  
sed sankta Petro diris tiam:

Jen, Majstro, lando! Stranga mondangulo!  
La homo preskaŭ muta, dorskurbulo!  
Kaj vidu rokojn! Malfeliĉa tero!  
El ĝi apenaŭ kreskos fungo, bero!

Ridetis Dio je prijuĝo moka;  
jes, diris, grundo estas tute roka,  
por fruktoj, grenoj varmo ne sufiĉa,  
sed homa koro estas varma, riĉa.

Dirinte tiujn vortojn li ridetis.  
De li rideto sin sur akvojn metis:  
sekiĝis marĉoj kaj el nub irante  
la suno longe brilis ridetante.

Ekstaris ili kaj daŭrigis vojon,  
sed oni diras, ke eĉ nun multfojon,  
se sub betulo sidas vi vespere,  
rideton vidas vi ĉielan tere.

Tradukis *G. J. Ramstedt.*



## Letero al la redakcio de E. F.

Turjanlinnasta, Suomussalmelta  
7 p. elok. 1918.

Tre estimata Sinjoro!

Juuri palanneena Vienan Karjalasta löydän kirjeenne ja vastaan, että minulla tietysti ei ole mitään sitä vastaan, että esperantoitte mainitsemianne pätkiäni, mutta mikäli käännökset tuottavat julkaisuillenne menestystä, niin pyydän jonkunverran korvausta oman arviointinne mukaan, josta emme sen pitemmältä keskustele.

Tyytyväinen olisin jos lähettäisitte minulle esperantojulkaisujanne, sillä ensimmäisen suurlakon aikoina olin aikalailla kirjevaihdossa esperantoksi ulkomaalaisten kanssa ja tahtoisin jos kerkiläisin palauttaa kauniin kielen muistiini.

Saluto:

Ilmari Kianto.

En supra letero la konata finna verkisto promesas publikigon de siaj verkoj kaj aldonas:

„Tre kontenta mi estus ricevante viajn esperantajojn, ĉar dum la unua granda striko (1905) mi sufiĉe korespondis en Esperanto kun eksterlanduloj kaj volonte mi, se nur la tempo tion permesos, refreŝigos en mia memoro la belan lingvon“.

\*\*\*\*\*

Ilmari Kianto.

## La Babela dislingvigo.

Kaj la tuta mondo havis egalan lingvon kaj egalan idiomon.

Kaj la homoj diris: ni konstruu por ni templan turon, kiu altiĝas ĝis ĉielo, por resti en bona konsento kun tiu, kiu supre loĝas.

Kaj ili komencis brikojn formi kaj baki, kaj ili kolektis rezinon por gluaĵo.

Tiam la Eternulo sin malsuprenigis por inspekti la templan turon, kiu estis kiel la *Ejfela* turo, kaj diris ĉagrene: „pro diablo, certe ili pint-suprenigos ĝin ĝis la nuboj, kaj tiam estos facila aliro al la ĉiela palaco. Ni nepre devas tion malhelpi“.

Kaj la ĉiela Eternulo elpensis taŭgan rimedon, ekiris kaj ekmiksis la tendenojn de la langoj de ĉiuj konstruantoj, tiel ke unu la alian ne povis kompreni.

Kaj sur la konstrua helptrabaĵo ekfariĝis kriado kaj tumulto kaj muta konfuzo, ĉar ĉies lingvoj tiel subite disdialektiĝis.

— Tiilia, tiilia! tuokaa lisää tiilia! \* unu laboristo finne kriadis; li nome okaze estis ĝuste la konstruanto, kies lingvon la Eternulo transformis en finnan idiomon.

Sed sube la virinaĉoj iris-reiris kaj ne komprenis, kion la viro supre deziris; ankaŭ

la bazo de ilia lango subite elartikiĝis kaj nun ili vane disputis pri tio, kion supre celis la viro. — Was wollen sie? <sup>1</sup> iu kriis. — Ŝto takoj? <sup>2</sup> dua takis. — Ŝurum burum? ĉar iu kredis ke li kriis trinkaĵon al si, alia ke li bezonis tabakon, tria brandon, iu eĉ interpretis laŭ sia lingvo ke la viro nome malpermesas a porti brikojn.

La majstroj blekegis kiel leonoj ĉiu laŭ sia lingvo vane konsilante la laboristojn, sed la ĉefarkitekto disbatis sian pugnon alte en la aero kaj malbenis la sklavojn per antikva hebrea lingvo; liajn malbenojn nur neniu komprenas krom la Eternulo, kies patra lingvo estis la antikva hebrea.

Kaj la Eternulo ridis en sia barbo kaj diris al la ĉefarkitekto:

— Vane estas disbati la pugnon en aero, ĉar vidu: ili ne komprenas vln!

Tiel la kaoso sur Babela konstruejo estis terura.

Sed kiam la laboristo, tiu kiu komencis finne paroli, ekvidis, ke la virinaĉoj sube ne komprenas lian parolon, li tre koleriĝis, ĉar li estis finna laŭ sia sango, kaj li kraĉis suben de la turo kaj malbenis tiel ke ĉiuj aŭdis, trifoje intersekve dirante:

— Voj prrr . . . voj prrr . . . kaj tiel plu, ĉar li vere celis *perkele* la maldion kiun li kredis batinta la turon.

— Parbleu — querelle! <sup>3</sup> tiam gaje revokis franca masonisto, kiu kredis la laboriston supre ĵargonantan lian lingvon, sed ankaŭ neniu komprenis, kion li celis.

Kaj la finna laboristo subeniris de la laborejo sur la turo kaj viŝinte siajn manojn je la pantalonoj li obstine iris al la kasisto:

— Herra ois hyvä ja maksais minun palkkani! <sup>4</sup>

Sed la kasisto skuis la kapon, tordis la buŝon kun la nigra barbo kaj videble tute ne komprenis, kion la laboristo volis.

— Minä lähden nyt pois, <sup>5</sup> — la finno klarigis: — diablo restu senlabora ĉi tie en la frenezulejo! Mi iros por fabriklabori en Kemijärvi. Sekve mi petas, sinjoro kasisto, la pagon . . .

— Klip, klap! klipis la kasisto, ĉar tian mirindan lingvon la Eternulo okaze donis alli.

„Kion tio eble signifas?“ pripensis la finno gratante al si la nukon. Eble li forgesis pri mia nomo, kiam li bruligis al si la langon“, kaj laŭte li diris:

<sup>1</sup> Kion vi volas (germane).

<sup>2</sup> Kio estas (ruse).

<sup>3</sup> Malbeno — disputo (france).

<sup>4</sup> Sinjoro, bonvolu pagi mian salajron.

<sup>5</sup> Mi nun foriros.

\* Brikojn, brikojn, alportu plu brikojn!

— Nu, mi ja estas Jussi Juppanen — certe vi tion trovos en la libroj.

— Primpata prampata! la kasisto ekdiris rigardante la laboriston rekte al la okuloj.

„Kion li eble rimpas?“ la alia penis diveni. „Eble li demandas, kiom oni ŝuldas al mi“.

Kaj laŭte li diris.

— Tutsemajnan salajron: dudekkvar markojn!

— Purlis kurlis! la konfuzita kasisto elparolis kolere disjetante la manojn kontraŭ la laboriston.

— *Saamari!*\* tiam la finno kolerete ekdiris. — Mi ne komprenas tian kurladon pli on virŝafo rusan lingvon. Donu la monon, aŭ mi montros, kiom bato kostas! . . .

Sed tien jam alvenis atake ĉiuj aliaj konstruantoj de la Babela turo, masonistoj, rezinkuiristoj, ornampentristoj kaj brikportistinoj, kaj ĉiuj ili samtempe alŝovigis al la kasisto kaj postulis de li monon, ĉiuj per sia lingvo. Sed neeble estis al ĉiuj kompreni unu la alian, ĉar la dislingvigo estus plena, ĉar la Patro Eternulo mem tiun kaŭzis.

Kaj okazis, ke ĉiuj tre nervincitigis.

Vidu: tiam estis unuan fojon vidataj tiuj, kiuj rabas en publikaj lokoj kaj kiuj estas anarkiistoj kaj malbonvolaj homoj nomataj.

Nome, la kasisto de Babelturo estis ĝisnude rabata kaj ĉiu prenis laborpage tiom, kiom permesis lia konscienco.

Kaj la konstruado de la Babelturo ĉesis tiun tagon kaj la laboristoj kun siaj superuloj disigis furioze malpacante.

Sed al la policanoj de la Babela regno Patro Eternulo konservis ilian komunan idiomon, kaj vidu: ili nun komencis kriante kaj signalante sekvi la kasrabinatojn, kaj ili efektive kaptis multajn kaj malliberigis ilin per mankatenoj kaj piedoĉenoj.

Sed la plendo de la kaptitoj estis korduŝanta, ke oni maljuston faris kontraŭ ili, kaj la zumo estis aŭdata ĝis la ĉielo, kie la Eternulo regis kun siaj anĝeloj. Kaj la Eternulo ne indulgis ilin.

Sed kiam la Diidoj, la antikve famaj herooj kaj teraj arogantuloj, kiuj vivis kun la homidinoj, vidis kio estis okazinta kaj ke neeble plu estis konstrui la templan turon ĝis ĉielo, tiam ili ordonis al la urbaj servistoj, ke la kaptitaj eksterlandanoj estu rigle enfermataj en la keletaĝo de la Babela templo, en tiu, kiun ili mem konstruis kaj kiu el la brikmasonaĵoj estis la plej fortika.

Kaj tiel okazis.

Sed la finna laboristo, li kiu pro sia


laboro 24 markojn prenis, povis fugi kaj vojaĝis kun bonŝanco ĝis la lando Finnlando nomata. Kaj li komencis labori en la fabriko de Kemijärvi, kiel li jam intencis, kaj vidu: li iĝis unua en Finnlando Adamo, el kiu la homa raso naskiĝis sur la Finnlanda duoninsulo.

Tiel pleningis la ĉielo kaj la tero, sed komence de la Babela dislingvigo estis ege malfacile al homoj kompreni unu la alian kaj konstrui ion grandan komunan, ĉar sinjoro la Eternulo tion ne deziris.

El la kolekto „Pikku syntejä“ (Peketoj) tradukis kun permeso de la aŭtoro

V. S.

Esperanta Finnlando 1918



ILMARI KIANTO (7.5.1874—)



JUHANI AHO (1861—1921)

\* Malbeno.



Juhani Aho.

## La Etuloj kaj Granduloj.

Kiu tion diris, ke la grandaj kaj fortaj estas potencaj kaj ke la malgrandaj kaj senfortaj estas senpotencaj? Ke la grandaj la malgrandajn gvidas, kaj la fortaj al la malfortuloj leĝojn donas?

\*

La ĉielo estas trankvila kaj blua kaj la mara surfaco ebena. Postondo nur tiam kaj tiam lavas malproksimajn rifojn kvazaŭ endorme ĝemante, ĉar la maro neniam dormas kaj neniam kvietiĝas.

Lekadante la bordojn de malkruta *rokkabo* fluas senbrua marfluo, de la vastaĵo venanta kaj al vastaĵo iranta. Hodiaŭ ĝi iras ĉi-tiel, hieraŭ tiel, kaj neniu scias, kiu estas ĝia celo. Sed la marherbaĵa arbaro balanciĝas kaj la trunketoj de la algoj fleksiĝas obeeme laŭ ĝi. La fundo travidetiĝas serioze bruna tra la verda akvo, kaj ekkrutiĝante ĝi minace malleviĝas en la misteran profundaĵon.

Tute ĉe la surfaco, tiel ke ondetaro vidiĝas sur la akva ebenaĵo, *lirlete* naĝas arego da fiŝetoj kontraŭ la fluo, laŭ la ekkrutiĝejo, trans la malserenan fundon kaj trans algajn branĉarojn. Kiel senfine longa rubando ili estas vidataj, de maro venantaj, al maro irantaj, kabojn trapasantaj, trans rifojn, laŭ bordoj, kies golfetojn ili eniras, kies ŝtonojn ĉirkaŭnaĝas.

De kie ili venas kaj kien iradas? Ne ŝajnas ili havi gvidon ian nek scion pri tio, al kiu celo ili iras, — ne gvidon alian ol scion pri siaj kunuloj, ne celon alian ol la kontraŭfluan. Ne disiĝas por momento eĉ unu el la aro de centmiloj, neniam ekŝanĝas la linio sian direkton tiel certan, kvazaŭ ĝi neniam estis alia. Ĝi estas kiel unu sola gigantulo, naskita de la unuanimeco de centmiloj da etuloj, gigantulo ĉirkaŭvolvanta la marojn, ĝiajn promontorojn kaj insulojn.

Sed apud la fluo de ĉi-tiu mara gigantulo embuskas la maraj rabistoj, ezokoj, perkoj kaj aliaj aviduloj. Kun skvamaro kupre kaj ore brilanta kiel kiraso kaj naĝiloj ruĝe reflektaj kiel militaj standardoj, surdorse ostaj lancoj kaj enbuŝe akraj dentoj, ili atendas en la interŝtonaj kavaĵoj kaŝite de la algaroj kiel rabistkavaliroj en siaj kasteloj, kaj atakas de tie severokule, buŝmalferme la preterpasantojn. Ili estas nomataj la maraj reĝoj kaj la bordaj princoj kaj ili mem sin kredas tiaj. Kaj tiuj etuloj, ili estas iliaj subuloj, de kiuj ili englutas kiom nur la rapido permesas.

Sed kion atentis la centmila aro pri tio, kiom el ili formanĝas kelkaj ezokoj kaj perkoj! Apenaŭ ĝi rimarkas ilian ĉeeston, apenaŭ deflankiĝas antaŭ ili. Iu solulo flankensaltas, enaeriĝas kaj penas *fui*, sed la granda amaso daŭrigas la vojon, kvazaŭ nenio okazis. Ili ne kontraŭstariĝas, ne fuas, ne eĉ plirapidigas la iradon. La mara fluo sole difinas la rapidon kaj la direkton de ilia naĝado nek la ezokoj kaj perkoj.

Kaj ĉi-tiuj granduloj devas sekvi la etulojn, la maraj reĝoj devas naĝi en la postfluo de iliaj subuloj — por vivi. La malgrandaj fiŝoj restas ĉiam je sia direkto, la granduloj devas sekvi, kien ili estas gvidataj.

\*

La malgrandaj fiŝoj estas popoloj, la granduloj iliaj subpremantoj.

Sed kiu tion diris, ke la grandaj kaj fortaj estas potencaj kaj ke la malgrandaj kaj senfortaj estas senpotencaj? Ke la grandaj la malgrandajn gvidas, kaj la fortaj al la malfortuloj leĝojn donas?

## FINNA ESPERANTISTO 1914

Pri kelkaj vortoj. En la supra traduko estas uzitaj sekvantaj vortoj, pri kiuj necesas diri ion.

F u a s (pakenee): tion faras la persekutato, kiu ne volas kontraŭstari sian malamikon, sed penas sin savi el liaj manoj.

Nuntempe oni fuĝas (1966).





# PRI L I B R O J

Reuven Kritz: *FRESA MATENO. El la hebrea lingvo tradukis Ota Ginz. Ilustris kaj la kovrilon desegnis Jona Kollmann. Libroj «Pura», Kirjta Mokin, Israelo, 1967. 11 x 18,5 cm. 282 paĝoj. Prezo: 24 steloj afrankite.*

Dum la Universala Kongreso en Roterdamo (1967), mi havis okazon paroli kun 24-jara samideano el Israelo, kiu partoprenis la militon de junio 1967 kiel maristo; li komandis armitan ŝipeton, kies militaj subuloj estis israelanoj naskiĝintaj en Egiptujo. Sed mia juna amiko estis blondulo, probable sabro\* el nordeŭropaj prauloj. Ni interparolis dum halto en restoracio, kiam mi kontraŭis francan komunistinon, kiu arde pledis la poraraban politikon oficialan de la kremluloj. Ĉar dum la Internacia Somera Universitato mi prelegis pri la prakanariaj judoj, mia ĵusa amiko, kiu ĉeestis, min dankis, kaj dum nia konversacio li eldiris, ke en Israelo estas du same obstinaj konvinkoj, kun kiuj dialogi estas preskaŭ senespere, nome la ortodoksaj judoj kaj la komunistoj. Li aldonis, ke li ne volas esti nomata *judo*, sed *israelano*, ĉar li estas ateisto kaj socialisto.

Dum la sama somero 1967, unu mia amiko katolika hebreisto, informis min en Zaragozo, ke li restis ok monatojn en kibuco, por praktiki kaj plifirmigi sian konon de la hebrea lingvo; tiu kibuco havis ĉirkaŭ 300 membrojn, kiuj senescepte estis ateistoj. Sed mia honesta amiko nur povis laŭdegi ilin, ĉar, estante klera kaj serioza katoliko, li povis konstati, ke neniam antaŭe li trovis tiom da respondecosento, tiom da amika komprenemo kaj simpatio al honestuloj, kiel en tiu kibuco.

Se nun oni volas kompreni, kial klera hispana katoliko estas admiranto de la israelaj kibucoj, kaj kial sabro povas esti ateisto kaj socialisto, ĝis nun mi ne povis trovi pli adekvatan respondon, pli taŭgan rimedon, ol rekomendi al miaj esperantistaj amikoj legi la libron de Reuven Kritz. Nur edukado povas tiel efike transformi homojn, ke ili tuj adaptiĝu, kun plena kapablo ekspluati lokajn cirkonstancojn. Kaj dum la legado de la libro de Kritz mi kunvojaĝis al tiu unika sperto, kiun praktikas la kibucoj. Probable ekzistas aliaj libroj, kiuj pli tede formale raportas pri kibucoj, sed neniam ĝis nun mi legis verkon, kiu onin enprofundigu tiel elokvente en la kernon mem, en la spiritan forĝadon de la kibucanoj.

Malgraŭ mia troa streĉiteco lastatempe, mi ne povis forlasi la libron, kiam mi eklegis ĝin; kiam mi revenis al ĝi, en marto 1968, por ĝin recenzi, tiu releĝo estis nur ravovojaĝo. Mi ne ripetos al vi, pri kio temas, ĉar certe vi jam havis okazon legi plurajn recenzojn, el kiuj la plimulto nur gurdadis banalajojn, dum kelkaj eĉ klopodis pilorii neekzistantajn lingvajn tuberojn de la traduko. Kelkfoje mi ne scias, kio estas pli lamentinda: ĉu la diletanta ĝoja memsufiĉeco de niaj gazetredaktantoj, ĉu la nanaj amatorajoj de niaj «lingvologoj», kiuj ĉefbonzece dekretas pri la boneco aŭ malboneco de normalaj —kaj foje prifierindaj— akiroj de niaj verkistoj.

## سُورَةُ الْبَقَرَةِ مَدَنِيَّةٌ

revelaciita en Medino.

Anstataŭ recenzo,  
jen specimeno de KORANO

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

2. Alef Lám Mím.\*\*

3. Ĉi tiu estas la Libro, en kiu ne estas dubo, gvidilo por la justuloj,

4. por tiuj, kiuj kredas je la Nevideblaĵoj kaj levas la preĝon kaj distribuas almozojn el tio, kion Ni donacis al ili,

بِسْمِ اللَّهِ الرَّحْمَنِ الرَّحِيمِ ①

الْم ②

ذَلِكَ الْكِتَابُ لَا رَيْبَ شَيْخٌ فِيهِ هُدًى لِّلْمُتَّقِينَ ③  
الَّذِينَ يُؤْمِنُونَ بِالْغَيْبِ وَيُقِيمُونَ الصَّلَاةَ وَمِمَّا  
رَزَقْنَاهُمْ يُنْفِقُونَ ④

Nun estas al mi multe pli klara la kaŭzo, kial la israelanoj venkis en la junia milito de 1967: homoj, kiuj edukigas en kibuca spirito, konsistigas unikajon, kies similon eble oni povus trovi en esceptaj historiaj malgrandaj komunumoj, sed nenie landkadre kaj vaste, kiel en Israelo. Temas ja pri superfamilio, kie la tradiciaj sociaj sistemoj kapitalismo kaj komunismo estas kunfanditaj en racian familiecan agordon, kiun la libro de Reuve Kritz bele tre ĉiĉeronas.

Sed la recenzata libro estas verko de samideano Ginz. Mi devas do aldoni, por esperantista publiko, ke Ginz sciis plenumi, en plej internacia, kristale pura lingvaĵo, sian nefacilan tradukan taskon. Estus stulte pretendi, ke Esperanto aperu ĉie en plej asepsa formo, kvazaŭ talentaj tradukistoj estus tradukmaŝinoj kaj rezignus sian propran stilon, sian koloron, sian lingvan registron kaj

alporti al la Esperanta komunumo sian beletran tembron. Kiam mi legis unue la libron, aŭtune 1967, mi sendis senkompromisan laŭdan dankon al amiko Ginz. Estas al mi aparte agrable tion publike ripeti.

Restas al mi formuli esperon. Post la milito de junio 1967, arabaj kaj judaj policistoj kunlabore reguligas la trafikon de Jerusalemo. Espereble la kibuca spirito, kiun Kritz hebree kaj Ginz Esperante tiel bone elvortigis, povos fariĝi komuna spirito inter ambaŭ israelaj komunumoj, tiel, ke ne plu araboj kaj judoj, sed egalrajtaj israelanoj povu, en siaj respektivaj lingvoj, interŝanĝi la samoriginan pacsaluton: *salam* kaj *ŝalom*. Tiel plenumiĝos la profunda kaj plej arda deziro de alia granda judo kaj homarano, nome Zamenhof, dank' al kies iniciato kaj streboj *Freŝa mateno* povas nun esti legata en tutplaneda vasto.

Juan Régulo—Pérez

## I. Ŝkapa

NOVAJ, NEKONTAJ MATERIALOJ PRI  
M. GORKIJ KAJ ESPERANTO

(Daurigo: Gorkij parolas plu:)

Ĉu vi memoras la rezonojn de la sciencisto Lomonosov en "Rusa gramatiko" pri la specifoj de lingvoj de diversaj popoloj? Lomonosov menciis la opinion de Karlo la Kvina, kiu kutimis paroli dece en la hispana lingvo kun dio, en la franca kun la amikoj, en la germana kun malamikoj, en la itala kun la ina sekso. Lomonosov asertis, ke se la Roma imperiestro lertus en la rusa lingvo, li trovus en ĝi majeston de l' hispana, viglon de la franca, subtilon de l' itala kaj super tio riĉon kaj forton en la priskriboj, koncizon de de l' greka kaj latina lingvoj. Turgenev nomis nian lingvon granda, verama kaj libera. Kaj mi diros: tia ĝuste ĝi estas. Sed, ĉu vi vidas en kio estas la esenco: Lomonosov, Turgenev kaj mi multpeka — estas neobjektivaj atestantoj: ĉiuj ni proksime parenas kun la rusa lingvo. Mi pretas aserti, ke por ĉiu popolo la gepatra lingvo estas la plej kara granda trezoro. Ĉu vi ne dubas?

— Ni ne dubas!

— En tio estas la najlo! Kaj kio koncernas Esperanton, tiun ĉi "nenies lingvon", laŭ objektiva atesto de l' pensantaj homoj, ĝi estas la lingvo, en kiu jam hodiaŭ oni povas trakti ajnan sciencan disciplinon kaj komprenigi sin kun malamiko, kiel ankaŭ kun la kamarado. Kaj, — Gorkij faris intence malserenan vizaĝon, lumiginte ĝin per ruzero en okuloj. — Kaj, certe, kun la amatino, decidante la plej gravajn demandojn de la ekzisto. Esperanto estas universala lingvo! Ĝi vivos, perfektigos kaj, mi ripetas, venkos ĉiujn malamikojn, faligante ilin subpieden. Ĝi estos la plej granda, kultura venko kaj, krome, plene sensanga.

Gorkij eksilentis mergiginte en rememorojn. Por momento li forgesis pri ni.

— Sed kial do, demandis Bobriŝev, — Esperanto ne estas propagandata? Niaj esperantistoj preskaŭ vegetas en postkorto?

Gorkij gruntis, denove movis ŝultron. La frunton krucis reto da sulkoj. eto da sulkoj.

— Ankaŭ ĝia vico venos. La unuajn jarojn post la Oktobro ankaŭ ĉe ni oni provis malfermi larĝe la pordon al Espe-

ranto. Sed... ĵo ekbremsis, iu ion ne prikonsideris, ĵien deflankiĝis. Alfluis tiom da urĝaj kaj bruligaj aferoj, ke mankis tempo por Esperanto. Kaj ĵu ankaŭ la malpurajn enmetis en la puran aferon. Sed mi estas certa: Esperanto traboros fluejon ankaŭ ĉe ni, ĉar ĝi estas la postulo de l' vivo. Esperanto komencos la novan epokon en la scienco pri la lingvo.

Mi demandis:

— Sed kial ne destini iun el la plej disvastigitaj naciaj lingvoj kiel helpa lingvo, se Esperanto ne estas akceptata de la registaroj?

— Bonege! Sed kiun "naturan" lingvon oni povas rekomendi por la celo?

— Nu, anglan, germanan, kaj, eble, iun alian? Unuvorte tiun, en kiu plejo da homoj parolas.

— Tiel do! Kial nun ne la ĉinan? En ĝi ja sin komprenigas kvarono da l' homaro. Krome, ĝi apartenas al la plej antikva popolo. Ne! Miaj karaj, — Gorkij dismetis la manojn, ajna lingvo, pretendanto por monddomino, estos proklamata agresa kaj simile al ajna Napoleono fiaskos. Ĉiuj mil kvincent lingvoj, movataj de vivaj bezonoj, furioze alarmos kaj faros juste. Ĉiu nacia lingvo konstruiĝis dum jarmiloj. La lingvo estas unu el ĉefaj elementoj, difinantaj la vizaĝon de l' popolo...

Gorkij ĵetis rigardon tra la fenestron, movis fingrojn, sin turnis al ni pri tio la poeto: "En lingvo la popolo sindonas. En ĝi naturo ĝia sonas, animo kaj "vivmaniero." Ajna gepatra lingvo ĉiam estas "plej bela", sed ĝi portas en si la ŝarĝon de l' tradicioj, kiuj faras ĝian gramatikon kaj prononcon komplika kaj malfaciligas la studon. Oni ja ne militus, diablo prenu, kontraŭ la tuta mondo por triumfo de la gepatra lingvo, eĉ se en ĝi parolas la triono da l' homaro! Ne kaj ne!

— Kaj se Esperanto ne ekposedos la amasojn kaj restos propraĵo de amatoroj — kiel tiam?

Gorkij ekradiis.

— Neniel, do! La homoj kreos alian lingvon, pli perfektan, sed nepre kreos. Tamen mi estas konvinkita, ke alia lingvo ne estos bezonata, ja ekzistas Esperanto. La homaro eniris la periodon, kiam progreso ne marŝas, sed flugas. Bezono en kontaktoj kreskas, akre kreskas ankaŭ neceso de l' internacia helpa lingvo. Kaj



tia lingvo povas esti nur Esperanto — mirakla interkomprenilo!

Gorkij denove tuŝis la malfacilecon de l' studo de "naturaj" lingvoj. Li asertis, ke tio disigas la homojn kaj eternigas al neniu bezonatan diverslingvecon. Subite li

laŭtegis la voĉon:

— Cetere, la diverslingveco estas bezonata al ekleziuloj kaj al la biblia Jehovo, jes! — Gorkij ankoraŭ pli vigliĝis. Multlingveco, laŭ opinio de religiaj servantoj, — estas la plej klara pruvo de enmiksiĝo de dio en la terajn aferojn. Pro la provo de homoj konstrui turon kun alteco ĝis la ĉielo, dio "miksas la lingvojn", senigis ilin de kapablo kompreni unu la alian. La miraklan turon, enkorpigantan la teran revon pri la ĉielo, ili disprenis por bestejoj kaj mem transformiĝis en duonbestojn.

Gorkij estis serioza. Rakontinte pri la "Babilona turkonstruo" kaj ĝiaj sekvoj, li notis kun nuanco de bedaŭro:

— Jen kion signifas eĉ en biblia trakto la diverslingveco. Kiam la homaro venkos la "malbenon de l' ĉiopova", ĝi kunfandiĝos en unu familion kaj akiros neimageblajn fortojn.

— Jes. sed kiam ĉio ĉi okazos?

Gorkij rapide respondis:

— Certe, ne laŭ dia ordono kaj eĉ ne laŭ nia volo! Certe, multo dependas ankaŭ de ni, ĉar nun ĉiuj vojoj kondukas al tio. Ni iras al komunismo, kiel nokto iras al sunleviĝo. Kaj Esperanto fariĝos la lingvo de morgaŭo. Tial ĉiu esperantisto estas homo, verŝanta akvon al la rado de ĉi-morgaŭo. Ĉiukaze, li, la homo, iras kun vizaĝo antaŭen, al estonto, sed ne malantaŭen, en pasinton.

Ni demandis:

— Tamen Esperanto malrapide trabatas sian vojon. Kvindek jaroj!

— Absolute ne tiel malrapide. Stulta obstino de iuj el la nombro de l' fortaj de ĉi-mondo strebas malhelpi al ĝia triumfo. Kvindek jaroj? Vi diras, — historie tio estas momento. Sed dum la momento la semo, ĵetita de Zamenhof, ekkreskis. Kaj iĝis arbo kun verda krono. Ĝi timas jam neniun sekigan veteron.

Ĝorkij denove sin adresis al la esperanta vortaro, denove komencis rigardi ĝiajn paĝojn. Intercetere li demandis:

— Ĝustaloke, ĉu vi scias la senĉon de l' vorto Esperanto? Vi ne scias? Ĝuanta

esperon, esperanta — jen estas ĝia signifo. Mi estas ankaŭ esperanta, kvankam, ve! mi ne estas esperantisto. Ne sufiĉis tempo — kaj nun mi bedaŭras. Sed oni ne kapablas ĉion ĉirkaŭpreni.

Rememorante denove pri Zamenhof, li diris:

— Grandan faron plenumis Ludoviko Zamenhof! ... Kiaj vortoj — vera muziko!

Foliumante, li legis.

— Mesĉanin — burĝeco. Parazit — parazito. Rabotnik — laboristo! Geroj — heroo, Gerojskij — heroa.

Bobriŝev kaj mi rigardis unu la alian kaj ne povis ne rideti. Gorkij ŝajnis, ke li legas sed reale li prononcis la vortojn, laŭ memoro ne rigardante la tekston. Sekve, Esperanton li estis studinta, kaj multon memoris.

Redonante la vortaron, li demandis:

— Ĉu vi ne okupiĝis pri la lingvo?

Provu: Mi scias, Tolstoj alte taksis Esperanton, studis ĝin. Ne nur Tolstoj: multaj seriozaj homoj konsideras Esperanton — ne bagatelajo.

Gorkij akompanis nin kiel novajn esperantistojn. Premis la manojn, amike ridetis. Iomete solene li basis:

— Ĝis: revido! Estonto apartenas al Esperanto (esperantligve).

La ekmiron sur niaj vizaĝoj li estingis per klarigo:

— Tio signifas... — kaj li tradukis siajn frazojn en rusan lingvon. — Studante sinonimojn de l' gepatra lingvo, okupiĝu ankaŭ pri Esperanto! Nenion vi perdos, multon vi akiros.

Alaono

Okazis tiel, ke post la konversacio kun Gorkij — tio estis en j a r o 1933 — nek Bobriŝev, nek mi povis sekvi lian konsilon, kaj ni ne alpaŝis al Esperanto. Nur post multaj jaroj ebligis rememoro pri Zamenhof kaj lia verko. Kaj tiam nevole aperis la penso: Kion do skribis Gorkij pri Esperanto? Ne povas esti, ke li preterlasis en silento la "titanan laboron" de Zamenhof, tiel alte taksita de li en la konversacio kun ni.


En la tridekvoluma verkaro mi ne sukcesis trovi eĉ mencion pri Zamenhof kaj Esperanto. Tamen iom da insisto — kaj la serĉoj kroniĝis de sukceso. En la ĵurnalo "Heroldo de artistoj" ("Vestnik Rabisa") N:o 7/10 por 1921 estas publikigita letero de Gorkij, entute dediĉita al Esperanto. Defendante la novan lingvon kontraŭ atakoj kaj

## 54-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Helsinki, 26.VII – 2.VIII.1969

Alta Protektanto: D-ro Urho Kaleva  
Kekkonen, Prezidanto de  
Finnlando

Adreso: Postilokero 17138,  
Helsinki 17, ĝirokonto  
21297.



## OFICIALA KOMUNIKO

Teatra programo definitiva

Internacia Arta Teatro anoncas, ke la definitiva programo de la Oficiala Teatra Prezento (dufoja) estos jena: "Vilhelmo la konkeranto", unuakta tragikomedio de Vanca Kljaković, "Aparta ĉambro", unuakta komedio de Claude Santelli, kaj "Hotelo", ŝerca sceno de Branko Copić. La t.n. "Libervola Teatra Prezento" enhavos: satiran komedion "Sonoriloj" de Smiljan Bozman, kaj la dupartan dramon de Milan Begović, "Sen la tria".

Efika informo kongreslanda

Okaze de la enoficiĝo de la nova Kon-

argumentante ĝian rajton de ekzisto, Gorkij skribis:

"Konservativa penso obstine pravas, ke Esperanto estas utopia iniciato. La viva leĝkonforme evoluanta realo, ne rapidante, sed ĉiam pli decide, refutas la opinion de l' konservativuloj".

En alia loko de la letero li deklaris:

"Oni diras, ke la lingvo ne evoluas, estante arfarita.

Mi ne estas esperantisto, sed mi scias, ke la arfarita lingvo, evoluante sufiĉe rapide, iĝas plene natura fenomeno, ĉar ĝi respondas al la neceso de l' nuntempaj homoj trovi, krei ĝenerale kompreneblan lingvon".

La leteron Gorkij finis jene:

"Ĉu oni povas nei, ke la lingvo, sola por ĉiuj, donas potencon impulson al la procedo de kultura evoluo?

Oni ne povas. Sekve necesas agnoski kiel neeviteblan – la kreon kaj disvolvon de la lingvo".

Daŭrigante la serĉojn, mi min turnis al la komplekto de "Informoj de CK SEU" (Izvestija CK SESR). En n-ro 3/4 por 1928 de la "Informoj" estis presitaj la

stanta Kongresa Sekretario, s-ro Mikuláš Nevan, LKK aranĝis komunan manĝon kun ĉefoj de helsinkiaj sendependaj inform-agentejoj, en la granda hotelo Marski.

Nova gramofon-disko preta

"Ĉi tie sola kantas mi" estas la titolo de nova gramofondisko, kiu enhavas ses el la plej belaj finnaj popolkantoj. Kantas ilin Sirkka Lehtivaara, jam konata pro sia prezentiĝo en la Varia Arta Vespero en Madrid. Akompanas fortepiane Marja Oja. La diskon eldonis firma Skandia, kaj ĝi estos aĉetebla en la kongresejo po 10,50 fmk. Antaŭmendojn akceptas Oskari Lehtivaara, Aleksis Kivenkatu 22-A, Helsinki 50, Finnlando.

fragmentoj el la artikolo de Gorkij "Respondo al inteligentulo" per jenaj vortoj:

"La strebo krei lingvon solan por ĉiuj homoj, estas unu el la arogaj ĝis frenezo aspiroj, kiuj ĉiam servis, nun servas kaj ĉiam servos al la afero de organizo de l' mondo laŭ volo de l' homo kaj por senlima disvolvo de l' kapabloj de l' homo.

Estas sendispute, ke parolante unu solan lingvon, la laboranta homaro multe pli rapide komprenus la nunecon de siaj interesoj".

Troviĝis ankaŭ aliaj fontoj (nepublikitaj leteroj, elpaŝoj en la gazetaro), atestantaj pri tio, ke Gorkij estis konvinkita adepto de Esperanto: la vortoj de l' granda homo neniam disiris de liaj faroj. Kun tio konsentos ĉiu, kiu interrilatis kun li kaj aŭdis la imponan, akcentantan ĉiujn vokalojn "o" (ne kutiman por Moskva prononco) tre konvinkan bason de Gorkii.

## I.Ŝkapa

Ilaj Ŝkapa estas soveta verkisto. Kun la famekonata soveta verkisto Maksim Gorkij li longe laboris en la ĵurnalo "Niaj Atingoj".

## PRI LA NOMO DE NIA LANDO

La Internacia Komisiono por Ordigo de Geografiaj Nomoj rekomendas al la verkistoj, gazetaro kaj ĉiuj aliaj esperantistoj uzi la nomojn proponitajn de la Komisiono dum 3-4 jaroj (sen alternativo), por post la praktiko fari definitivan decidon pri eventualaj ŝanĝoj. Inter la proponitaj nomoj troviĝas Finnlando.

Al tiu rekomendo ni respondas kun absoluta rifuzo. Por tion motivi ni donas tabelon laŭ la principoj, inter kiuj la Komisiono "ofte devis serĉi kompromison", kun la premiso, ke ekzistis tri aŭ fakte kvar elekteblaj nomoj: Finnlando, Finlando, Finnujo kaj Suomio. Jen la tabelo:

- a) Zamenhofaj principoj  
prefere ZA praktiko
- b) enradikiĝinta uzo
- c) internacia rekoneblo
- d) deziro de enlanda  
esperantistaro

Estas neeble al ni ŝanĝi la nomon de Esperanta Finnlando jam pro tio, ke la jarkunveno de Esperanto-Asocio de Finnlando 1966 unuanime decidis ke la nomo de la asocio restos tia. Kio koncernas nian revuon, ĝia nomo estas kia ĝi estis de la fondo en 1907/1907-1914 Finna Esperantisto kaj ekde 1917 Esperanta Finnlando. Neniu esperantisto de nia lando proponis ŝanĝon de ĝia nomo.

Per si mem estus malgrave, ĉu skribi en la nomo de la lando unu 'n' aŭ du, sed en la nomo de la nacio du estas necesaj. Estas necese aldoni, ke en nia lando — sen lingva diskriminacio — estas citeblaj pluraj grupoj da finnlandanoj (svedaj, laponaj, germanaj, rusaj), kvankam nombre malgrandaj, ĉiuj ne estas finnoj.

Finnlando Finlando Finnujo Suomio

50 +	% 50 - %	-	-
de ĉ. 1900		-	-
2000-jara uzo		-	-
99 %	?	-	kelkaj unupuloj

La Komisiono deziras praktikan sperton pri, kiuj nomoj estas nepre korektendaj. Eble la plej bona kriterio koncerne la nomon de nia lando estas tio, ke 'Finnujo' tute ne estas uzata.

Debatontoj jam preparas sin

Novaĵo en la programo de la 54a UK estos la Debato, ĉi-foje je la temo: "Esperanto — ĉu ideologia aŭ praktika instrumento?" La batal-langojn jam pretigas la enkondukontoj de la Debato: S-ino Emilija Lapenna (por la ideologia flanko) kaj s-ro E.L.M. Wensing (por la praktiko).

Novaj turismaj prospektoj aperis

Ankaŭ pri la urboj Jyväskylä kaj Hämeenlinna aperis anticipe al la 54a UK kolorilustritaj turismaj prospektoj. Interesitoj petu ĝin de: Kaupungin Matkailutoimisto (Turisma Oficejo), Jyväskylä au Hämeenlinna, Finnlando.

Aliĝintoj

Ĝis la 5a de junio aliĝis entute 1612 personoj el 36 landoj.

La redakcio de Esperanta Finnlando.

## TURISMAJ FALD-PROSPEKTOJ

aperis el jenaj lokoj:

JYVÄSKYLÄ, Finnlando

HÄMEENLINNA, Finnlando

NOEVEGA ŝtata fervojo

HARKÁNY-varmobanejo, Siklos-fortikaĵo, Villanyi-vilaĝo, Hungario

Grotoj de centra SLOVAKIO

HISPANAJ fervojoj eldonis libreton 1 ilustritan, 40 paĝan

GEOLOGIO INTERNACIA, volumo 1,

Prago 1968, eldono de Geindustria np.

Praha estas 192-paĝa kolekto de originalaj verkoj en Esperanto. Mendebila de

Geindustria np., Komunardŭ 6, PRAHA

7, aŭ per aliĝo al Geologia sekcio de

Internacia Scienca Asocio Esperantista (en Finnlando per M. Rekunen, Kautiala-

Kangasala.



## LA PLEJ MODERNA

Ĉu vi scias, ke le plej modernaj lernolibroj de diversaj lingvoj uzas la rektan metodon, kaj kelkaj el la unuavice menciindaj enhavas kontinuan rakonton aŭ historion?

Kaj ĉu vi scias, ke la esperantistoj posedas la plej senmankan adapton de tiu metodo, en

Privilegia vojo al lingvoscio — Esperanto.

kiu estas, laŭ informo de UEA, la plej multe vendata lernolibro en ĝia libro-servo?

Multaj eminentuloj esprimis sian aprobon al la verko. Plej laste, profesoro Arnold Lazarus (fako: angla edukado, en Purdue University, LAFAYETTE, Indiana, Usono, skribis en letero de la 6-a de marto 1969:

PRIVILEGIA VOJO AL LINGVOSCIO estas vera triumfo de krea imagopovo kaj praktikeco!

Per PV vi povas lerni nian lingvon sen uzo de vortaro, se vi havas bonegan memoron. Sed eble vi forgesis iun vorton aŭ volas eklegi iun Esperantan verkon — ekzemple LA VERDAN KORON de Julio Baghy, kiun ni varme rekomendas — tiam vi bezonas vortaron. Taŭga kompletigo de la naturmetoda lernado estas tiam la OVO-vortaro:

OPORTUNA VORTARO DE ORDINARA ESPERANTO

kiu donas simplajn sed sufiĉajn klarigojn en Esperanto de ĉ. 3000 vortoj el la centra vortprovizo de nia lingvo. Vidu sur alia paĝo specimenon de ĝi!

O. V. O. estas vera sensacio por la lernantoj de Esperanto kaj eĉ al progresantoj.

PRIVILEGIA VOJO 4,25 mk/13 steloj  
Oportuna Vortaro 5,00 mk/13 steloj

FONDUMO ESPERANTO  
IRISLAHTI, FINNLANDO

NI HONORAS  
KAJ KONDOLENCAS

K KALLE VÄISÄLÄ, profesoro de matematiko sinsekve en la universitatoj de Tartu (Estonio), Turku kaj (la teknika) de Helsinki, nortis en Helsinki en septembro 1968. Same kiel liaj fratoj Vilho kaj Yrjö li aliĝis al nia movado kiel juna studento en la komenco de la 1910-aj jaroj, kaj tiam kunlaboris en "Studenta Societo Esperantista" de la Universitato de Helsinki. En 1914 li studis en Göttingen (Germ.) kaj veturis de tie al Parizo por partopreni la 10an UK, kiu neniam okazis pro eksplodo de la milito. Tie li renkonstis kun Vilho Setälä kaj kune ili aventuro reveturis al Finnlando tra Anglujo, Norvegio kaj Svedlando al Raumo, have na urbo finnlanda ĉe la Botnia golfo. — La patro de Kalle Väisälä, kontoristo Johano Veisell, estis eble la unua finno kiu eminente partoprenis en la agado por internacia lingvo, nome kiel eminenta volapükisto. Kiam komenciĝis la kvereloj inter la adeptoj de tiu lingvo, li forlasis ĝin, sed antaŭ tio li jam publikigis lernolibron de Volapük por finnoj. La idealon heredis la tri filoj-universitataj profesoroj, kiuj ĉiuj grave partoprenis en nia movado — kaj la du aliaj ankoraŭ partoprenas.

La redakcio.

KAARLO JOKINEN mortis la 17-an de majo en Helsinki. Li estis unu el la plej agemaj samideanoj en nia ĉefurbo. Dum longa tempo li gvidis esperantan kurson en la Laborista Instituto de Helsinki kaj prizorgis diversajn honoroficojn precipe en la laborista movado. Li estis ankaŭ estrano de Fondumo Esperanto dum deko da jaroj, kaj prizorgadis ĝian libroservon. — Bedaŭrinde la familio ne permesis al esperantistoj ĉeeston en lia funebra ceremonio.

HELMI NOPONEN mortis la en junio en Tampere. Ŝi estis edzino de Herman Noponen, pioniro kaj gvidanto de nia movado en Tampere, ĉe kio ŝi fidele helpis kaj stubtenis sian edzon. Nian koran kondolencon al la familio.

YRJÖ KUORIKOSKI mortis la 18-an junio en Helsinki. Li estis redaktoro de la Ĵurnalo Helsingin Sanomat. Precipe dum la pli fruaj jaroj li diligente partoprenis en nia movado en kelkaj honoraj oficoj de la organizaĵoj, ĝis multaj laboroj kaj nebona sano malhelpis lin en tio.

**B**

bovo

bovo &amp; bovino: kortbesto bredata pro lakto

brako: elstara parto de la korpo, kiu finiĝas per la mano B:homo 4-9

branĉo: parto de arbo, kreskanta el la trunko B

brando: forta alkohola trinkaĵo

brasiko: "kapo" formata de larĝaj folioj de legomo sen tigo B

brava: sen/tima

bredi: kreskigi bestojn kaj zorgi pri ili

bremsi: mal/rapid/igi aŭ haltigi la iradon de veturilo

breto: tabulo kuŝanta sur kiu libroj, vazoj ktp B

bret/aro: meblo el multaj bretoj

brido: jungilo por la kapo de ĉevalo §6

brigado: grupo da soldatoj

fajro/brigado estingistoj de brulego

brikoj: bakitaj argilaj eroj (arte/faritaj ŝtonoj) por dom/konstruado

brila: forte lumanta

broĉo: ornama buko B

broso: ilo farita el pork/haroj aŭ aliaj fibroj B

brovoj: haroj super la okuloj B:homo 45

bruo: neregula, neharmonia kaj malagrable sono B

bruli: difektiĝi en varmego per aero, produktante varmon kaj fariĝante cindro B

bruna: kvazaŭ malpura koloro flave-ruĝa

brusto: supra parto de la korpo B: homo 10

bruto: kvarpieda hejma besto: bovo, ĉevalo

bubalo: bovo kun grandaj kornoj, bredata en la oriento B

budo: malgranda butikoj, vendejo




bufo: grandeta speco de rano B

buko: fermilo de zono B

buklo: spirala fasko da haroj

bulo: pli-malpli ronda objekto

bulbo: bulo/forma dikiĝo de kreskaĵo, ĉe la radiko, sur tero B

civitano **B**

bulko: negranda pan/bulo B: bulkoj sur pleto

bulvardo: strato kun arboj laŭlonge

bumerango: ĵetaĵo, kiu revenas al la ĵetinto B

burĝono: tubero sur branĉo el kiu kreskas folio aŭ floro

buŝo: truo en la kapo por enpreni manĝaĵon B: homo 49, 62-71

butero: graso farita el lakto

butono: ronda fiksilo en vestaĵo B

**C**

caro: rusa imperiestro

cedi: ne kontraŭstari

ĉioma kaj apendico: B homo 91

ĉioma oni volas aŭ devas atingi aŭ trafi B

ĉirkaŭtempo, precipe de cirklo kiu oni pensas

ĉioma oficiala solena festo

ĉioma ufoj B

ĉioma nas

ĉioma amiko

ĉioma 5,7,8,9

ĉioma nigra) B

ĉioma B

ĉioma da arbo

ĉioma o



# Opportuna Vortaro de Ordinara

**ESPERANTO**Prezo 5 mk  
13 stelojĉioma ĉirkaŭtempo, precipe de cirklo kiu oni pensas  
ĉioma oficiala solena festo  
ĉioma ufoj B  
ĉioma nas  
ĉioma amiko  
ĉioma 5,7,8,9  
ĉioma nigra) B  
ĉioma B  
ĉioma da arbo  
ĉioma o  
ĉioma ĉarmeco, ĉeestantoj ktp  
ĉioma citi: redoni ion... ana diris aŭ skribis  
ĉioma citrono: acida frukto, B fruktoj  
ĉioma civilizi: instrui bonajn kutimojn, kulturon  
ĉioma civitano: libera membro de demokrata regno

**UEA BEZONAS VIN** por povi pli sukcese plenumi siajn taskojn kaj por doni al vi ankoraŭ pli da praktikaj servoj.

**ALIĜU JAM HODIAŬ KIEL INDIVIDUA MEMBRO DE UEA**

Kotizojn akceptas Joel Vilkki, Somero, poŝta ĝirokonto Tu 60253. (M kun jarlibro 16 mk, kun abono al revuo Esperanto 32 mk).

-----  
---

**1969: Jaro de novaj perspektivoj**

Helpu la kampanjon por fortikigo de UEA en 1969 – la jaro de novaj agadoj – per tuja aliĝo aŭ pago de via kotizo kiel Membro-Abonanto.

-----  
---

**UEA – Reprezenta Organizaĵo**

UEA estas la reprezenta monda organizaĵo de la neŭtrala Esperanto-Movado, rekonita kiel tia de UN kaj Unesko, kun kiu ĝi havas regulajn konsultajn rilatojn.

Helpu la klopodojn de UEA ĉe internaciaj instancoj per tuja aliĝo kiel individua membro de la Asocio.

-----  
---

**UEA estas Via Organizaĵo**

Ju pli forta UEA, des pli efike ĝi povas agi por la Internacia Lingvo, des pli da avantaĝoj ĝi povas doni kaj des pli da praktikaj servoj prezenti al la membraro. Helpu fortikigi UEA en ĝia Jubilea Jaro per tuja aliĝo kiel individua membro!

-----  
---

**PRAKTIKAJ SERVOJ DE UEA**

Tuta malgranda armeo de pli ol 3400 lokaj kaj fakaj delegitoj estas je dispono de la membraro de UEA por ĉiaspecaj praktikaj servoj.

Utiligu la lingvon por viaj praktikaj celoj pere de la delegita reto de Universala Esperanto-Asocio – unika en la mondo – kaj pere de trideko da fakaj aŭ specialigitaj organizaĵoj aliĝintaj al UEA aŭ en kontraktaj rilatoj kun ĝi.

Ankaŭ vi povas fariĝi fakdelegito. Aliĝu al UEA kiel Membro-Abonanto kaj fariĝu fakdelegito por via fako! Per tio vi helpos al vastigo de la praktikaj servoj de UEA kaj samtempe mem havos pli da eblecoj utiligi la lingvon por praktikaj celoj.

-----  
---

**UEA kaj la Junularo**

Al la junularo apartenas la estonteco. TEJO – la junulara sekcio de UEA – prizorgas la disvastigon de la lingvo en la medioj de gejunuloj ĉie en la mondo. Por helpi sian junularan sekcion UEA fiksas aparte favorajn kotizojn por gejunuloj.

Aliĝu kiel Juna Membro-Abonanto (JMA) aŭ kiel Membro-Abonanto kun "Kontaktoto" (MAK), la luksa kvaronjara revuo por gejunuloj!

Arne Bengson, Åbybergsgatan 32, MÖLN-DAL, Sved. Kun finnino, ŝat. legadon.

Miloslav Blažek, Volgogradská 17, OSTRAVA 4, Ĉeĥoslov.

Ranko Gavranović, 25 j. literatur.

Brankica Gavranović, 20 j. studentino. Adreso de ambaŭ: Cvijićeva 84a, BEOGRAD, Jugosl.

Jánis Rukšáns, Blaumana 21-20, RIGA 11, Latvio

Eszter Pörös, Kertváros u. 12, PÉCS, Hungar.

**ESPERANTA FINNLANDO (fondita en 1918), ĉefredaktoro: Vilho Setälä**

**Adreso:** Esperanta Finnlando, IIRISLAHTI. **Aperas 9-foje jare. Abonprezoj:** enlanda 5 mk, eksterlanda 6 mk (15 rpk); abonu prefere per la poŝta ĝirokonto 6915.

**Anonprezoj:** tuta paĝo 100 mk, duona 50 mk, kvarona 25 mk; pli malgrandaj unukolonaj 0,35 mk/mm. – **Eldonas Fondumo Esperanto.**

**Redaktoroj:** Jussi Jäntti, Jorma Ahomäki, R. J. Milton. Ĉies kontribuadoj estas bonvenaj.

meder-offset-hki-69

